# Bona Espero

**Cirkulero 65**
**por la amikoj kaj subtenantoj de Bona Espero r. a.** **decembro 2005**
prezidanto: Otto Nelken ★ Hirschfeldstr. 6 ★ D-59581 Warstein
☏ +49-(0)2902-57460 ★ 🖷 +49-(0)2902-911323 ★ 🖳 u. nelken@t-online. de

Karaj geamikoj de Bona Espero,

unue *Giuseppe kaj mi* kune kun ĉiuj bonesperanoj ŝatas saluti vin ĉiujn koreĝe el Brazilo kaj danki vin tre speciale pro via helpo kaj fidelo.

Ĉiutaga provizo
Per aldonaj mondonacoj ni povis plivastigi dum la jaroj la frukto- kaj legomoplantejojn en Bona Espero. Tio signifas por ni gravan pliboniĝon en la ĉiutaga provizo. Unuafoje ni kapablis oferti tiom multe da bananoj kaj papajofruktoj. Ĉiutage ni surtabligis melongenojn, karotojn, brasikon, tomatojn kaj manjokon. Grava helpo ĉe la produktado de tiuj ĉi nutraĵoj kompreneble estas la traktoro, kiun vi, karaj geamikoj, ja financiis antaŭ tri jaroj per viaj mondonacoj kaj pro tio ni tiel dankemegas.
Nuntempe grandega epidemio furiozas inter milionoj da bovoj en Brazilo. Feliĉe ni povis vendi ĉiujn niajn bovinojn ĝustatempe kaj tial ne riskis la buĉadon de niaj bestoj. Per la bone investita mono ni nun aĉetas ĉiutage la lakton ĉe la najbaro. - Cetere, eĉ nian 19 jarojn aĝan buson ni nun ankoraŭ povis vendi.

Niaj infanoj
Entute ni akceptis dumjare 41 infanojn, nuntempe loĝas ĉe ni 31. Kelkaj nur restas nedaŭre ĉe ni por esti liberigitaj el iu malbona situacio. Ekzistas pli kaj pli seksa misuzado (je 80% en la propra familio). En ĉiuj kazoj la nova aktivega junulara konsilantaro prizorgas la infanojn kaj transdonas al ni post kontrolo de la familia situacio. Antaŭe la infanoj restis en la familio.



Oni aljuĝis al ni kvar gefratojn, post kiam la plej aĝa de la entute sep infanoj (v. foto), *Deŭzimar*, estis denuncinta sian patron. Ĉi tiu gravege malbontraktis sekse dum du jaroj sian filinon *Maria Odete* (9), tiel ke ŝi eĉ devis esti operaciita pro siaj fortaj lezoj.


Post sukcesa operacio *Maria Odete* pro siaj posttraŭmataj problemoj nun estas en psikologia kuracado en Goiania kaj revenos poste denove al Bona Espero. Feliĉe ŝiaj tri fratoj fartas tre bone ĉe ni kaj ili lernas diligente! La juĝisto liberigis la tri plej junajn gefratojn por adopto. - La patron li kondamnis intertempe al 23 jaroj de aresto. Kvankam la patrino sciis pri ĉio kaj ne protektis sian filinon, ŝi malgraŭe rajtis nun viziti siajn infanojn ĉe ni.
Similajn problemojn ni havis ankaŭ pro la ŝoforo, kiu ĉiutage transportis niajn grandajn infanojn en la lernejon (5-a ĝis 7-a klaso) al Alto Paraíso. Ni "denuncis" lin, ĉar li "instruis" sekse la knabinojn. Intertempe ni sukcesis, ke la urba administrado maldungis tiun viron.
Al niaj nove akceptintaj ankaŭ apartenas *Nataniel* (6) kaj lia fratino *Melissia* (9). Ilia patrino estas en malliberejo, ĉar ŝi mortigis sian edzon.
*Beatriz* (15) hejme estis misuzita ekde sia sesa vivjaro. Ĉar la infanprotekta konsilantaro ne helpis ŝin, ŝi fuĝis antaŭ du jaroj el sia familio, laste vivis sur la strato kaj estis en malliberejo ĝis ŝi venis al ni. Ŝi estas tre malfacible traktebla, sed inteligentega kaj ŝi nepre volas daŭrigi la lernadon. Nun ŝi vizitu novan monaĥinan lernejon en Alto Paraíso kune kun *Igor*, *Emanuelle* kaj *Silvana*.
Ĉar ni ne havas alkoholon, prokurorino el Cavalcante antaŭ ne longe sendis la alkoholulinon *Rosa* (33) kun ŝia 2 monatojn aĝa bebo (v. foto) kaj ŝia 5 jara ne sufiĉe nutrita filino (nur 14 kg). *Rosa* havas entute sep infanojn, el kiuj la plej aĝa jam havas 18 jarojn. Ni unue protestis kontraŭ tiu ĉi akcepto, sed pli poste ni nin sentis devigataj, helpi la infanojn. Ekde ŝi estas ĉe ni, Rosa ne drinkas plue, sed estas sufiĉe normala kaj per diligenta kunlaboro harmonias.



Niaj kunlaborantoj
Malgraŭ tiuj novaj kaj kreskantaj problemoj ni ĉiuj bonfartas. *Giuseppe* lekcionas matematikon en la 4-a klaso, orientigas detale la laboron de la 5 masonistoj kaj – dum mia malĉeesto – ankaŭ la laboron de la kuiristino, purigistino ktp..
La lernejo funkcias bonege, *Ada* daŭre instruas la infanojn plejresponde kaj kun multega tempo, forto kaj granda entusiasmo laboras por la bona funkciado de ĉio.
Granda ŝoko por ni estis la neatendita foriro de *Armindo* kaj *Lindomar* al Alto Paraíso, kie ili nun estras restoracion.
Sed niaj specialaj gardanĝeloj denove helpis. Ni ja perdis du laborantojn, sed anstataŭ ilin jam trovis du novajn: *Susi*, la edzino de Orlando, nun estas ĉi tie kun *Gabriella* (1), kuiras same bone kiel Lindomar, estas tre diligenta, kaj ni estas tre kontentaj pro ŝi. *Orlando* nun ne plu devas veturi al la urbo

dumsemajne. Nur semajnfine la malgranda familio iras al Alto Paraíso, ĉar *Orlando* ankaŭ por la preĝeja komunumo ankoraŭ tre aktivas.
Krome venis al ni la patrino de Emanuelle, *Denise*, , kiu zorgas por la infanĉambroj kaj helpas ĉie. Krom la 11 jara *Emanuelle* ŝi havas ankoraŭ tri knabojn (1,5,8). Ŝi estis senlabora kaj kompreneble feliĉa, havanta siajn infanojn ĉe si kaj sufiĉe por manĝi por ĉiuj. Poste nun surprize montriĝis ke ŝi jam estas graveda de kvin monatoj.

Nia nova lernejo
Ĝustatempe antaŭ komenco de la pluvsezono ni povis pretigi la tegmenton – financiita per via helpo, karaj geamikoj, pri kio ni tre dankemas al vi. Ankaŭ akvon kaj elektran energion ni jam instalis. Eĉ se la konstruaĵo ankoraŭ ne pretas, ni ĝojas, ke ni jam povos festi ene nian grandan kristnaskan renkonton ventontsemajne kune kun multaj gepatroj, eksbonesperanoj kaj amikoj.



Ni bonesperanoj deziras al vi ĉiuj benitan, ĝojan kristnaskfeston kaj pacan novjaron

via Ursula Grattapaglia

Kiel vi, karaj amikoj kaj subtenantoj, povis legi en la raporto de Ursula, intertempe vivas en Bona Espero pli kaj pli grave damaĝitaj infanoj same kiel nun eĉ tri patrinoj kun ŝiaj beboj. Tio signifas certe multajn ŝanĝojn kaj altajn postulojn en la ĉiutaga kunvivo. Aldone Ursula kaj Giuseppe estas postulataj per daŭraj surprizoj pro la helpantoj kaj nun ankaŭ pro la nova konstruaĵo de la lernejo. Kun unu granda klasĉambro, kuirejo kun provizejo kaj kunvenejego same kiel manĝejego por ĉiuj bonesperanoj tio estas kompreneble grava spaca pligrandigo. Ĉi tie ne nur infanoj, kiuj vivas en Bona Espero, ricevas instruadon kaj nutraĵon, sed ankaŭ tiuj el la ĉirkaŭaĵo, por kiuj la vojo al la urbo estus tro laciga kaj malproksima.

Por pretigi ĉion ankoraŭ mankas en Bona Espero konsiderindaj financaj rimedoj. Sed oni esperas ankaŭ ĉi tie inter alie pri subteno de ambasadoroj, kiel jam ĉe la konstruo de la urba domo. La edzino de la germana ambasadoro montris sian grandan intereson pri Bona Espero, tiel ke Ursula kompreneble tuj invitis ŝin.

**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)**

Karaj geamikoj, per via financa subteno vi helpis denove multajn junajn homojn en Brazilo, por ke ili ne devu vivi sur la strato. Nome de tiuj infanoj ni dankas vin pro viaj valora helpado kaj fideleco ankaŭ ĉijare.
Mi deziras al vi kune kun la tuta estraro ĝojan, benitan kristnaskon kaj bonan novan jaron

via Otto Nelken

**<u>Grava peto:</u>**
Por ŝpari sendkostojn ni planas sendi kiel eble plejmulte de la rondleteroj per retpoŝto. Se vi ŝatas ricevi la rondleteron estonte retpoŝte bonvolu skribi tion al nia retadreso <u.nelken@t-online.de>. Ni antaŭdankas pro via respondo.



**donacokonto: konto-numero 26 484 ĉe Sparkasse Meschede (BLZ / bankkodo 464 510 12)**